

TEA-BULTENO

20^A JARO - N° 137

MAJO-JUNIO

N. 5-6/2017

Nenio al ni apartenas, nur la tempo estas nia.
Lucius Annaeus Seneca (4 aK - 65 pK)

Karaj Geamikoj!

En aprilo okazis la 19^a Konferenco de Alp-Adriaj esperantistoj en Brežice, Slovenio, kie oni ĝuis bonegan programon, kaj seriozan kaj distran. El la diversaj eroj, unu estis dediĉita al la memorigo de la 100^a mortodatreveno de nia Majstro, kiu je la 14^a de aprilo 1917 forlasis ĉi mondon.

Nunajare tra la kvin kontinentoj pluraj estas la grupoj kaj asocioj kiuj organizis/os plej malsamajn aranĝojn liahonore.

Tial ankaŭ mi deziras rememori en ĉi Bulteno iel la elstaran figuron de nia Ludoviko, helpe de versaĵoj de elstaraj poetoj, kiuj havis la ŝancon konatiĝi kun Li aŭ, simple, tre admiris kaj amis Lin kaj lian geniaĵon Esperanto. La poetoj kapablis eligi el sia koro tiel belajn vortojn, kiuj ankoraŭ nun nin ĉiujn emocias kaj faras tiel, ke daŭre ni sentu Lian ĉeeston en ĉiu nia poresperanta faro. *Via redaktanto*

Jubilea Kantato

Feliĉa la semanto estas,
Printempe kiu semis grenon
Kaj en aŭtuno festas
De bonrikolt' solenon.
Feliĉa, kies kor'
Pri granda verko revis,
Kaj el la revo-flor'
La frukton elricevis.
Arbeto, kiun, Majstro kara,
Vi plantis ĉe Vistul-river',
Elkreskis ĝis lazuro klara,
Etendas branĉojn ĉirkaŭ ter'.
Sub ĝi kolektis milojn
La jubilea nova sent',
Kaj ligas terofilojn
Neŭtrala fundament'.
Krakovaj muroj ĝoje sonas,
Dum lernantaro multnacia
Dankeme Majstron kronas
Per verdo laŭfolia.
En niaj koroj, granda hom',
Stariĝas monumentoj;
Benata via nom'
Ĝi vivos, vivos tra jarcentoj!
Antoni Grabowski

Zamenhof mortis!!

Via pura spirit' amis homaron,
por ĉiuj estis frata via koro,
estis via deviz' am' kaj honoro
al kiuj vi aldonis gloran faron.

Ne timante la montojn, nek la maron
brile flugadis ĉien via gloro
kaj ĉie restos via rememoro
kiun la homoj metos sur altaron.

Nun tra la mondo kuras sanga fluo,
nun ploras via familia rondo,
la planed' tremas pro pafada skuo.

kaj la ŝip' brulas sur la mara ondo...
kaj dum regas malamo kaj detruo
jam vi ne povas resti sur la mondo.

Rafaelo de San Millán

Ĉe la tombo de la Majstro

Spirite venis mi, pilgrima ombro
Alpelita de sento danktributa,
Kaj pie haltas ĉe l' dezerta tombo,
Kie ripozas Via cindro muta.
Antaŭ Vi, Majstro, restas mi medite:
Min rabas foren, alten, embarase
Memoraj pensoj fluaj vaghezite,
Kirliĝaj ŝtorme en la mens' amase.
Mia spirito trista kaj izola
Sereniĝas ĉe Via tomb' azila,
Je nevidebla ombro prikonsola.
Ripozu pace, granda hom' humila!
En kor' fekundis Via nobla gvido,
Zorge kulturatas Via pac-armeo,
Tra l' vasta mondo, kun konstanta fido,
La semojn de l' interna fratideo.
Kun vi en mondon venis nova sento,
Post Vi ĉe ni la venkespero:
Ke la amo triumfu en kunsento,
Ke la ĝojo ekfloru el sufero.

Luigi Minnaja

Kafo, bonefika trinkaĵo

Antaŭ kelke da jaroj okazis en Triesto prezentado de diversaj tipoj de kafo, ne tiom konataj al la ĝenerala publiko, tial mi ne povis malĉesti tiun gravan eventon! Ankaŭ ĉar entute mi estas kafo-drogemulo, dum grandega parto de mia samurbanaro suferas pro tiu sama problemon!

Triesto... Urbo de Kafo!!! Ekde la fino de la napoleona regado kaj sub la aŭstra-hungara estrado, ĝi iĝas la plej grava imperia haveno kaj alirpordego por ĉiuj varoj venantaj de Amerikoj kaj Hindioj. Kafo, unu el tiuj varoj, fariĝas tre populara en ĉiuj eŭropaj urboj ĝuste komence de la 1800^{aj} jaroj. En tiu epoko, rimarkante la transitadon al aliaj landoj de la kaf-plantaj fruktoj, Triesto malkovras sian grandan amon al tiu aroma trinkaĵo, amon kiu daŭras ankoraŭ hodiaŭ, kiel evidentas pro la amaso da personoj kaj stukturoj, kiuj fervor-pasie agemas ĉiutage por garantii la absolutan bonecon de tiu produktaĵo, evoluigante krome altnivelajn servojn, konatajn nun tutmonde.

Laŭdire, en Triesto kafon oni trinkas, sed ĉefe ... spiras! Tie kaj tie ĉi tra la urbo, rekte aŭ nerekte, ĉiu strato, ĉiu palaco estas ligitaj al kafo: importistoj, transportistoj, instalaĵoj pri selektado kaj transformado, magazenoj, bazaroj, kafrostadejoj, kafejoj ...

Jen, nun facile kompreneblas, pro kio tiu aranĝo allogis min.

La tuto, relative interesa, disvolviĝis, per transdono de malmultaj sed ne tiom konataj informoj, ĝis preskaŭ la lasta momento, kiam la organizanto proponis ian specon de kvizo al la ĉeestantaro. Oni invitis ĉe la scenejo tri - ni diru - "kobajojn", por ke ili gustumu tri diversajn tipojn de kafo kaj eldiru sian opinion, rilatan al la aromo, gusto, amaro aŭ malamaro, koloro ks. Tre malsamaj estis la respondoj, kompreneble, tamen precipe pro tio tre interesaj. Fine iu kunlaboranto alportis aliajn tri tasetojn



da kafo, informante, ke temas pri nepri-skribeble eksterordinara unik-aĵo. Ĉiuj oreloj ekpintiĝis por perdi eĉ ne unu vort-

on. Post eta klariga enkonduko oni malkaŝis, pri kio temas: en tiuj tasetoj estas kafo eltirita el zibetaj fekaĵoj. Ekestis problemo: kiu el la tri kuraĝos ĝin gustumi kaj iel komprenigi

al ni sian sensaĵon? Tuj unu montriĝis la plej scivolema kaj multimema, ankaŭ ĉar certe li eksentis, ke ĉies okuloj algluiĝis al lia gesto, alporti la tason al la buŝo. Mallonge dirite, gutet-post-guteto li malplenis la ujeton kaj, puŝita de la prezentisto, murmuris siajn pensojn pri gusto, aromo ktp, pri kiuj, sincere dirite, mi ne plu memoras.

Post tiu okazaĵo, mi ne plu pensis pri tiu zibeta kafo, sed antaŭ kelke da semajnoj, tuthazarde, en interreto mi trovis informon pri ebleco aĉeti ĝin. Nur scivolemo min puŝis al rigardado, ne certe la nepra bezono aĉeti kaj gustumi tian trinkaĵon. En Triesto tute ne bezonatas elserĉo de tiaj nenecesaj specialaĵoj, ĉar ĉiutage eblas al mi trinki mian preferatan kafomarkon kaj de tio ricevi tre agrablajn gustoimpresojn, tre energiodonajn ĉefe matene. Nekredeblaĵo! Estis tuta listo da malsamaj kafspecoj, interalie aĉeteblaj je *astromoniaj* prezoj. 50 gramoj da kafo fekita de zibeto kostis ekde 14,65 € plus 11,59 € por la sendo el Britio!



Ĉiuj nomiĝis *Kopi Luwak* kaj parenteze estis skribite: *Civet Cat*. Tio iomete konfuzis min, ĉar en la nPIV-o mi trovis la terminojn *zibeto* kaj *civeto*, *genoto* kaj *vivero*, tial malfacilas kompreni, pri kiuj bestoj efektive temas. Eble iam la dilemon mi solvos! Estas eblo ankaŭ ŝpari, ĉar se oni aĉetas 250-graman paketon, ĝi kostos nur ... ĉ. 54,00 eŭrojn! Ne forgesu tamen la elsendo-kostojn! Esploru, esploru interrete!

Pripensante la aferon, mi ne multon maltrankviliĝis, ĉar se homoj ŝatas tion, kial ne? Eble iom ekstravaganca kutimo, sed se tio ne suferigas bestojn, kaj se la loĝantoj, ekzemple en mizeraj teritorioj afrikaj kaj aziaj, povas ricevi vivrimedojn el la plukado de fekaĵetoj, tiu afero eĉ bonas, ĉu ne?

Sed ni ĉiuj tre bone konas niajn *bestojn*! ... pardonu, mi intencis diri, niajn *homojn*! Tio stimulis min al plua esplorado. Unue, kio fakte okazas? Nu, la trinkota kafo devenas de kafoberoj parte digestitaj kaj poste eligitaj de zibetoj. Ĝis ĉi tie nenio speciala. Sed kiel oni arigas la bezonatajn kvantojn por produkti la kafon? Komence, la kafoproduktantoj mane rikoltis la eligaĵojn zibetajn apud la kafplantejoj, sed kiam oni malkovris, kiom da mono povus eniri la poŝojn per facila eksplutado de tiu natura zibeta bezono, la afero iĝis tragedia por la kompatindaj bestoj.

Jam de jaroj kaj jaroj oni kaptas tiujn zibetojn en la arbaro, fermas ilin en etaj kaĝoj, manĝigas al ili, perforte kaj ekskluzive, kafo-grajnojn, kiuj ordinare konsistigas nur minimuman parton de ilia normala dieto.

Kiuj estas la pluaj konsekvencoj de tiu sistemo? En la naturo la zibetoj elektas la manĝindajn kafberojn, nome manĝas la plej maturajn fruktojn, ĉar pli dolĉaj. En kaptiteco ili ne povas mem selekti, ĉar enkaĝigitaj: la prizorgantaro nutras ilin per grajnoj havantaj malsamajn stadiojn de maturiĝo, kio inter alie aliigas ankaŭ la guston de la farota kafo.

Tiel la bestoj, senigitaj je libereco, naturaj spacoj kaj adekvata dieto rapide malsaniĝas kaj ofte prezentas deprimajn aŭ neŭrozajn kondutojn. Kutime oni ilin ekspluatas tri jarojn kaj poste ili estas liberigitaj, sed iliaj fizikaj kaj psikaj kondiĉoj jam ne plu permesas alfronti la iamajn vivcirkonstancojn en la arb-

aro, tial ofte post la liberiĝo ili mortas.

Kiaj estas la fazoj de tiu kafprilaborado? La berojn, jam digestitajn, oni unue purigas kaj poste rostas. La interna parto ne estas digestebla, sed la stomakaj enzimoj de zibetoj atakas la eksteraĵon, forigante tiel parton de tiuj proteinoj donantaj la amaran guston. La ĉefa karakterizaĵo, kiu kvalifikas la *Kopi-Luwak*-on, konsistas fakte en malplia percepto de la amara gusto kaj en la pliigo de ĉokolada saporo. Tiu kafo produktiĝas en limigitaj kvantoj: 500 kilogramoj devenas de sovaĝaj zibetoj kaj 50 tunoj de la bredado. La prezo varias inter 500 kaj 900 eŭroj kilograme, tiel eblas kalkuli ke taso de tiu ĉi kafo povas superi la sumon de 10 eŭroj.

Oni ja devas havi sufiĉan kuraĝon por trinki kafon el fekaĵoj, sed eĉ pli grandan, ekkoninte la hororon kiu kaŝiĝas malantaŭ tiu ĉi fia komerca ekspluatado! Elda Doerfler

El gloraj intaj tempoj

El Itala Esperanta Revuo - 1924

Trieste: En la ĉambrego de la hotelo *Moncenisio*, riĉe ornamita per naciaj kaj esperantaj flagoj havis lokon sabaton 2^{an} de Februaro granda festeno por festi Prezidanton D-ron Arturo-n Ghez, novan kavaliro de la krono de Italio. Ĉeestis 56 gesamideanoj kaj kvar invititoj, inter kiuj Kav. Vincenzo Greco, sekretario ĉe la ĉi tiea poŝtdirekcio kaj D-ro Jeroniti. Giovanni Pascoli, supera poŝtdirektoro, malhelpata ĉeesti la festenon pro la alveno de L. E. Ministro Thaon de Revel, sendis ĝentilan telegramon.

Parolis Sekretario D-ro Polidori, Vicprezidanto D-ro Koch kaj Instruistino F-ino Asquini. Spritan paroladon faris ankaŭ sam. Kons. Simonis, dirante ke aserto de P-ro Guarnieri, ke Trieste estas tombo de Esperanto, ŝajnas iomete malvera, ĉar ni fakte pruvas ke la granda ideo de lingvo internacia preskaŭ ĉiutage plu kreskas kaj floras en nia urbo. "Neniu - aldonis

Kons. Simonis - neas aŭ dubas ke P-ro Guarnieri havu specialan emon por fariĝi lerta enterigisto sed certe ne por enterigi Esperanton". Korduŝita respondis Kav. D-ro Ghez, parolante itale kaj esperante, kaj esprimis sian plej koran dankon por la bela kaj ne forgesebla festo: li invitis ĉiujn daŭrigi en la laŭdinda agado por la disvastigo de helpa lingvo. D-ro Ghez sin turnis poste al sam. Carlo Umberto Trani*, ankaŭ ĵus kavalirigita, sciigante la ĉeestantaron pri la gravaj persekutoj, kiujn sam. Trani suferis

siatempe flanke de la aŭstria registaro pro siaj naciaj sentoj. Je la fino de la festeno la menuoj, elegante presigitaj en esperanto, turnis kiel rondirantaj kajeroj de samideano al samideano por kolekti la subskribojn de ĉiuj ĉeestantoj.

Sekvis la kantado de nia himno, muziko kaj dancoj ĝis tagiĝo.

**ndr: konata eldonisto en Trieste, ĉe kiu Arturo Ghez eldonis gramatikon pri Esperanto, de li verkitan, en 1921.*



Laste trovita



Per medalo, en la jaro 1985, la ŝtata monfarejo en Varsovio memorigis pri la 40-jara datreveno de la venko super la hitlera Germanio kaj la fino de la milito en Eŭropo. La medalo estas el flava bronzo kaj pezas 145 g, mezuras 69,5 mm kaj estis mendita de la Vojevodio Komitato de Demokrata Partio en Cheĥm. La skulptisto estas Tadeusz Tschorzewski.

Averso: la Brandeburga Pordego en Berlino. Du glavoj detruas svastikon. Skribo supre en la pola lingvo, malsupre en Esperanto. Reverso: Virino flugigas kolombon. La vorto "LIBERECO" estas en 15 lingvoj. Datoj: "9.V.1945 - 9.V.1985".

Laste trovitaj!

En la rubriko *El intaj tempoj* de la januara-februara TEA-Bulteno, estis publikigita letero rilate la demandon: *El kia lingvo devenas la esperanta vorto "edzo"?* Tio estis skribita en la *Germana Esperantisto* - jan. 1908. Fine de marto atingis min la informo, sendita de Mag. Bernhard Tuidier pri la aperigo en la retejo *Trovanto* de la Esperantomuzeo kaj de la Kolekto por Planlingvoj, okaze de la 100^a mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof, de 19 originalaj liaj korespondaĵoj. Memkompreneblas, ke haste tie mi ekesploris. Tuj mia atento estis kaptita de la 5^a poŝtkarto, adresita al D-ro Herz el Zuriko, la 6^{an} de junio 1906. Jen la respondo de LLZ al iu supozita demando pri la vorto "edz".

D^{RO} L. ZAMENHOF

VARSOVIO.
str. Dzika № 9.

Kara Sinjoro.

La vorto "edz" estas sufikso (kiu tamen

kiel ĉiuj aliaj sufiksoj estas uzata ankaŭ memstare); ĝi havis en la komenco la formon es (prenitan el la francaj princesse, maitresse k.t.p.); laŭ la leĝoj de Esperanto ĝi devis tamen por la virinoj havi la formon esino kaj es restis sekve por la viroj. Sed "es" tiam estis okupata por la verbo, en kiu ĝi signifis la tempon "imperfectum", tiel mi el "es" devis fari "edz", tiom pli, ke pri "es" oni ĉiam, pensus pri virino. Poste "es" malaperis, kaj "edz" restis.

Al Vi kaj al Esperanta Societo en Via urbo mian koran saluton


Via *Zamenhof*

Nun ekestas dubo: ĉu tute erara do estas la klarigo donita de s-ro N. P. *Evstifeieff*? En "Lingvaj Respondoj" nenion mi trovis tiurilate. Kion diras la studemuloj pri ĉio ĉi? Mi esperas ricevi kromajn detalojn pri tio.

En la ĉea kolumno estas la kopio de la karto, kiun ankaŭ vi povas stoki en vian propran, virtualan, arkivon, ĝin prenante ĉe la jena adreso:

<https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/arkivajoj/>

Varme mi konsilas traserĉadon kaj tralegadon, se vi deziras surpriziĝi kaj trovi trezorojn pri nia Majstro kaj Esperanto! Danke al impona skanado entreprenita en la Esperantomuzeo, gvide de Mag. Bernhard Tuidier, eblas konsulti neelĉerpeblan fonton da historiaĵoj en la Katalogo TROVANTO: libroj, dokumentoj, revuoj kaj ĵurnaloj, fotoj k.m.a. Estas kiel havi proprahejme la valoran historion pri Zamenhof, pioniroj, movado ks.



Ankoraŭ io pri la poŝtkarto. Supre, sur la malantaŭa parto kie Zamenhof skribis, legeblas la nomo de grava itala esperantisto, kiu multe laboris kaj agadis dum sia tuta vivo favore al nia lingvo:

Rafaelo Bagnulo el Napolo (1880-1975).

Ĉefadvokato de la financa ŝtata juristaro en Bolonjo, li estis frutempa pioniro de la Esperanto-movado en Italio: li eklernis Esperanton en 1902.

Li estis kunfondinto de la unua itala E-organizaĵo kaj de la unuaj periodaĵoj. Partopreninte en la 1^a UK en Bulonjo-sur-mar, li havis viglan korespondadon kun d-ro Zamenhof. Gravan rolon li ludis en la informada kampo.



E. D.

Fontoj: *Trovanto* (Esperanto-Muzeo Vieno); *Enciklopedio de Esperanto*; *Wikipedia*


Kie Esperantumi?

En **Herakleo (Matero)**

greka urbo en suda Italio ĉe la maro,
por la **84^a Itala Kongreso de Esperanto de la 26^a de aŭgusto ĝis la 2^a de septembro 2017**.
Venu por ĝui mirindan etoson en la regiono Basilikata, en tute internacia medio!

Programo riĉega kaj interese, tiom ke tre malfacilas la elekto, inter Seminarioj pri *Informado kaj konsciigo al publikaj rilatoj* - Lu Wunsch-Rolshoven, *Esperanto-gazetaro sub lupeo* - Osmo Buller; prelegoj pri *"Hieraŭ" kaj "morgaŭ" en pluraj lingvoj, inkluzive la semidajn* - Fabrizio Pennacchietti, *Platono kaj lia Respubliko: trarigardo de la plej fama eseo* - Emanuele Regano, *Kvin marbordaj urboj dediĉitaj al Heraklo* - Maria Butan, *Ski-kurado tra la mondo* - Hannes Larsson; kursoj diversnivelaĵ, kun Anna Löwenstein, Nina Pietuchowska, Rafael Mateos Gonzàlez; koncerto pri *Bereŝit: La kantado de la komenco* - Piero Nissim, Maria Bruno, Franco Meoli; spektaklo pri ventro-dancado - Paola Tosati; libroprezentoj kaj kantateliere kun Kajto; kaj koncertoj, kaj teatraĵoj, kaj amuziĝoj, kaj interamikiĝoj, kaj ekskursoj ĉiutagaj tra la mirinda regiono Basilikata!

Ĉu jam konvinkita pri la partoprenindeco de ĉi kongreso? ĉu jes? Do, ek al la ttt-ejo de FEI: www.kongreso.esperanto.it



Somera programo en Gresillon!

10-17julio: Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (precipe franclingve).

gresillon.org/s1

10-27julio: Maratona Esperanto-kurso kun *Perla Mielo*.

17-27julio: Renkonto de Alternativoj de ĉiuj specoj kaj koloroj (*proponu temon!*).

gresillon.org/s2

28julio-4aŭg: **FESTO**, junulara E-renkonto kun koncertoj.

05-13aŭgusto: Festa semajno por infanoj kaj familioj. gresillon.org/s3

aŭg-21/28: **SOMERAS**, internacia danco-semajno, pupteatro, Esperanto-kursoj.

gresillon.org/s4

Skribu al bertox@free.fr se iu semajno interesas vin.

Kaj pli poste

sept-11/15: Migrada semajno (en Esperanto) kun *Olivier Buisson*.

okt-25/29: Korusa renkonto de *Interkant'* kun *Zdravka Lenepveu*.

okt-25/nov-01: **AŬTUNE** la ferioj - kun halo-vena festo, seminario pri instruado kaj uzo de Esperanto kun infanoj.



KULTURA KUNFANDIĜO DE LA MULTETNA EŬROPO

INTER-FEST (= Internacia Festivalo) estas nov-tipa Esperanta kultura festivalo, kiu celas fariĝi rekonata eŭropa Esperanto-aranĝo kun vasta gamo da programoj, kiuj al neesperantista publiko prezentos praktikan uzeblon de Esperanto kaj pere de tio instigos ĝian lernadon kaj instruadon.

INTER-FEST volas intensivigi la Esperantan kulturkreadon kaj levi la prestiĝon de Esperanto en la kultura kampo.

La programoj de **INTER-FEST** inkluzivos diversajn branĉojn de literaturo, teatro, muziko, filmo, sporto, klerigo, lingvolernado, interkultura interŝanĝo, turismo kaj aliaj aktivecoj, kiuj efektiviĝos per prelegoj, diskutrondoj, seminarioj, koncertoj, prezentaĵoj, konkursoj, sportaj eventoj, kolokvoj, ekspozicioj ktp.

KIE?

La 1^a **INTER-FEST** okazos en **Bjelovar** (Kroatio), 90 kilometrojn nord-oriente de Zagrebo, de kie la festivala urbo facile atingeblas buse, trajne kaj aŭtomobile. Bjelovar, urbo kun 42 000 loĝantoj, estas sidejo de la Departemento Bjelovar-Bilogora kaj loko kun forta Esperanto-tradicio ekde 1909.

KIAM?

De la 6^a ĝis la 12^a de aŭgusto 2017.

Ekskursoj dum INTER-FEST

→ en la regiono de Bjelovar kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, konata kiel hejmo de pli ol 20 nacioj!

→ al la regiono de Zagorje (norde de Zagrebo) kun la plej fama katolika pilgrimejo Marija Bistrica, la plej fama kastelo Trakoŝćan, la etnovilaĝo Kumrovec, la baroka urbo Varaždina, la trovejo de neandertala homo en Krapina kaj pluraj terbanejoj.

→ al la regiono de Zagrebo, spurante la vojojn de la Esperanta poeto Nikolao Hohlov, verkinta en Zagrebo sian poemaron *La Tajdo*, kaj vizitante ankaŭ plurajn ZEO-jn en la urbo!

→ al la Nacia parko LAGOJ DE PLITVICE.

→ antaŭ- aŭ post-festivala feriado borde de Adriatika maro, ktp.

Pliajn detalojn oni trovos ĉe:

<http://www.esperanto-bjelovar.hr/festival/esperanto.html>

Maja Programo	
4-a, ĵaŭdo	17h00 - Unua-gradaj kurso
5-a, vendr.	20h00 - Bildoj pri Esperanto
11-a, ĵaŭdo	17h00 - Unua-gradaj kurso
12-a, vendr.	20h00 - Legado de la teatraĵeto de Arturo Ghez: LA VENTUMILO
18-a, ĵaŭdo	17h00 - Unua-gradaj kurso
19-a, vendr.	20h00 - Brežice: la Alp-Adria Conferencejo - aprilo 2017
25-a, ĵaŭdo	17h00 - Unua-gradaj kurso
26-a, vendr.	20h00 - Babilado kaj ... pico kaj ŝaumanta biero!
Junia Programo	
1-a, ĵaŭdo	17h00 - Unua-gradaj kurso
2-a, vendr.	Sidejo fermita
8-a, ĵaŭdo	17h00 - Unua-gradaj kurso
9-a, vendr.	20h00 - Prezento de verkistoj, el la "Historio de la Esperanta Literaturo" - C. Minnaja-G. Silber
15-a, ĵaŭdo	17h00 - Unua-gradaj kurso
16-a, vendr.	20h00 - Semajno en Parizo! Projekciado de fotoj pri la fascina ĉefurbo Francia
22-a, ĵaŭdo	17h00 - Unua-gradaj kurso
23-a, vendr.	20h00 - Planado pri nia agado post-feria!
29-a, ĵaŭdo.	18h00 - Unua-gradaj kurso 19h00 - Somera Festo

Atentigo!

Ekde la 1^a de julio ĝis la fino de aŭgusto la sidejo estos fermita.

La redaktanto de la TEA-Bulteno tamen ne ripozos kaj akurate (eble!) atingos vin via ŝatata informilo.

Bonan feriadon kaj ĝis la revido ĉe TEA-sidejo, vendredon la 8^{an} de septembro, je la 19^a horo!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Eida DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

Kunventagoj: ĵaŭde 17-19; vendrede 19-21

Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936

Banka Konto: Unicredit-IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Asociaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

Uno per tutti ... cinque per mille! AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO!

*Il 5 per mille dell'IRPEF
all'Associazione Esperantista Triestina
Associazione di volontariato
senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni di legge, possono destinare il **5 per mille delle imposte** a sostegno delle Associazioni di **VOLONTARIATO**.

La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.

È sufficiente indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella per il VOLONTARIATO nel momento in cui si effettua la dichiarazione dei redditi (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc).

**Il codice fiscale da indicare
è il seguente:
90012340320**

Invitiamo perciò amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi questo numero di Codice Fiscale.

GRAZIE!!!

TROVANTO: Esplorenda kaj legenda trezorejo pri Esperanto

Lige al la 100^a mortodatreveno de Zamenhof, la viena Esperanto-Muzeo celas ĉi-jare prezenti ĉiujn verkojn de Ludoviko Zamenhof, aperintaj ĝis 1930, kiuj troviĝas en ilia kolekto. 125 libroj jam estas libere kaj senpage legeblaj en la retejo de la muzeo IEMW. Kelkaj ankoraŭ sekvas dum la venontaj semajnoj.

Verkoj (1887-1930) de Ludoviko Zamenhof: <https://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/ludwik-l-zamenhof/>



Aŭtoris Jean-Pierre Cavelan (Yanpetro Kavlan).